

KATOLIKA SENTO

Periodico dell'Unione Esperantista Cattolica Italiana (UECI)

www.ueci.it

"Per la promozione della fratellanza e della comprensione tra i vari popoli di diverse lingue" (Paolo VI)

Periodico bimestrale - Reg. trib. di Vercelli 22.12.1997 n. 306 -
Sped. in abb.post. art. 2 comma 20/c L662/96 - filiale di Vercelli -
Direttore resp.: Mons. Gianni Ambrosio - Dir. e amm.: Vercelli, via Benadir, 62
stampato da **arena.net** - Grisignano di Zocco (VI)

Anno 94 - n. 5
SETTEMBRE-OTTOBRE 2015

21^a Ekumena Esperanto-kongreso (Strasburgo: 1-8 Aŭgusto 2015)

Dum la semajno de sabato la 1-a de Aŭgusto ĝis sabato la 8-a, okazis en Strasburgo la 21-a Ekumena Esperanto-kongreso ĉe la junulara gastejo *Ciarus*. Aliĝis 61 homoj el 17 landoj: (11 Francoj, 9 Germanoj, 7 Rumanoj, 6 Svedoj, 6 Italoj, 4 Nederlandanoj, 3 Hungaroj, po 2 Angloj, Estonoj, Kroatinoj, kaj Slovakoj kaj po 1 Aŭstriino, Ĉeĥo, Ĉino, Koreanino, Polino, kaj Sviso). La efektive partoprenantoj estis 59 (5 italoj). Dek ses atingis Strasburgon rekte el Lillo, kie, la antaŭan semajnon, okazis la Universala Kongreso.

Ĉi-foje la kongreso estis organizita de KELI, precipe de ties prezidanto Philippe Cousson, kiu tre bone organizis ĉion. Se ni aldonas la gravecon de la urbo gastiganta, la proksimeco de la kongresejo al la lurbocentro, la bela vetero (ankaŭ se iom tro varma) ni povas taksi ĉi tiun kongreson vere ĝuinda. Ununura bedaŭro la limigita partopreno de la orient-eŭropanoj, eble pro la tro altaj prezoj en la okcidenta

Eŭropo, aŭ ankaŭ pro la distanco. (Same okazis pasintjare en Trento malgraŭ, ankaŭ tie, la apartaj rabatoj).

Temo de la kongreso "**Donu al mi trinki**" (Joh 4,7) – "La malsameco pliriĉigas min", estis la sama sugestita por la semajno de preĝoj por la unuiĝo de la kristanoj kaj inspirita



La grupo de italoj ĉe la sanktejo de sankta Odilia



Kongresanoj en la halo de la Eŭropa Parlamento

al la evangelia epizodo, en kiu Jesuo kaj la Samarianino donas reciproke sian akvon. Tia interŝanĝo de spiritaj donacoj estu ankaŭ inter la malsamaj kristanaj konfesioj.

La kongreso komenciĝis sabaton vespere per la interkona vespero kaj vespera preĝo. Dimanĉon matene okazis la malfermo kaj la Sankta Meso en la apuda katolika preĝejo de S-akta Petro Juna. Posttagmeze estis la gvidata vizito al la protestanta preĝejo de S-akta Petro Juna kaj poste, en la sama preĝejo okazis Ekumena Diservo fare de la pastoroj Philippe Cousson, Gerrit Berveling kaj de pastro Benoît Ente. Al tio sekvis orgen-koncerto laŭ la loka somera programo. Vespere okazis la oficiala inaŭguro kun la interveno de lokaj reprezentantoj kaj la unua prelego pri la temo fare de la prezidanto de IKUE, Giovanni Daminelli, kiu parolis pri la kialoj de sia aliĝo al la katolika Eklezio. Sekvis la prelego de la prezidanto de KELI, Filippe Cousson, kiu pliprofundigis la ekzegezan signifon de la epizodo de la Samarianino.

Laŭ la programo, en la matenoj de la postaj tagoj estis la S-akta Meso, celebrata de la dominikana pastro Benoît Ente, en kapelo de apuda monaĥejo, kaj poste, en salono de la

kongresejo, komunaj preĝoj kun kantado kaj prelegoj. Tre interesaj prelegoj estis tiuj de pastoro Gerrit Berveling pri la interreligia dialogo, de prof-ro Gérard Siegwaldt pri la graveco de la religio, kaj, tre kortuŝa, la rakonto de la Zhang Fude el Ĉinio pri la travivaĵoj de siaj geavoj dum la kontraŭkristana persekuto fare de la komunisma reĝimo de Mao. La posttagmezaj

eventoj okazis ekster la kongresejo. London ni vizitis la katolikan Katedralon, la luteranan preĝejon de s-akta Tomaso, la Metodistan preĝejon kun la apuda riĉa biblia ekspozicio entenanta Bibliojn de diversaj lingvoj (ankaŭ en Esperanto) kaj epokoj, kaj, fine la rumana Ortodoksan preĝejon. Mardon ni vizitis la katolikan preĝejon de s-akta Petro Juna. Kompreneble, en ĉiuj preĝejoj oni priskribis ĝian historion, la artaĵojn kaj la nunan agadon. Merkredon okazis la tuttaga ekskurso, matene al la turisma vilaĝo Obernai, kaj al la surmonta sanktejo de s-akta Odilia kaj posttagmeze al la vilaĝoj Hohwald kaj Gertwillwer, kie ni vizitis fabrikon de spicpano. Ĵaŭdon matene estis la jarkunveno de IKUE kaj KELI kaj posttagmeze okazis gvidata vizito al la Eŭropa Parlamento. Revenante ni vizitis la Sinagogon de la Paco akompanataj de rabeno, kiu priskribis la ritojn kaj la hebrean kulturon. Vendredon matene okazis en la kongresejo la Protestanta S-akta Manĝo kaj la posttagmezo estis libera tempo taŭga por la vizito de la urbo; vespere la kutima adiaŭa vespero.

La ĉiutagaj preĝoj kaj primeditoj estis prenitaj el la libreto eldonita por la ĉijara tagoko de preĝoj por la unuiĝo de la kristanoj.

PRI LA EKUMENAJ KONGRESOJ

Prikonsideroj de la prezidanto de IKUE

La pasintan jaron, post kvar jaroj, oni estigis Ekumenan Esperanto-kongreson, kaj ĉijare okazis denove Ekumena kongreso.

La temoj de ĉi tiuj du kongresoj estis tiuj proponitaj por la semajno de preĝoj por la unueco de la kristanoj. La unua – *ĉu Kristo estas dividita?* – memorigis al mi, ke la fundamento de niaj eklezioj estas unu: Kristo. La ĉi jara temo – *donu al mi trinki* – rilatis la renkontiĝo de Kristo kun la Samaritanino: du homoj de malsamaj hebreaĵ gentoj, kiuj donas unu al la alia sian *akvon*.

Post la rekono de la unueco de nia fundamento (Kristo), ni estis invitataj doni unu al la alia. Sed kion doni? Papo Francisko skribis en sia apostola instigo "Evangelii gaudium" en la ĉapitro pri la ekumena dialogo:

Se vere ni kredas en la libera kaj malavara agado de la Sankta Spirito, kiom da aferoj ni povas lerni el la aliaj! Ne temas nur pri ricevo de informoj rilate al la aliaj, por pli bone koni ilin, sed transpreni tion, kion la Spirito semis en ilin, kiel donacon ankaŭ por ni.

Ĉi tie la Papo mem rekonas, ke la Sankta Spirito ne apartigas la kristanojn (Kristo ne estas dividita), sed Li disdonas malavare siajn donacojn al ĉiuj. De tio la invito interŝanĝi niajn donacojn.

Kion ni povas interŝanĝi en niaj kongresoj? Ni ne estas teologoj, sed ni povas interŝanĝi niajn spertojn, amikecon, preĝojn, kunvivadon. Tio estas multo, se ni pensas al la jarcentoj de miskomprenoj kaj de bataloj travivitaj de niaj antaŭuloj.

Kiel diris papo Francisko dum la renkontiĝo kun la valdanoj:

La unuiĝon oni realigas en la irado, per

SUI CONGRESSI ECUMENICI

Considerazioni del presidente dell'IKUE

L'anno scorso, dopo quattro anni si è avuto un Congresso Esperantista Ecumenico e quest'anno un nuovo congresso ecumenico.

I temi di questi due congressi furono quelli proposti per la settimana di preghiere per l'unità dei cristiani. Il primo – *forse che Cristo è diviso?* – ci ha ricordato che il capo delle nostre chiese è uno: Cristo. Il tema di quest'anno – *dammi da bere* – si riferisce all'incontro di Cristo con la Samaritana: due persone di diverse stirpi ebrae, che si donano reciprocamente la propria *acqua*.

Dopo aver riconosciuto l'unità del nostro fondamento (Cristo), siamo invitati al reciproco dono. Ma che cosa dare? Papa Francesco scrive nella sua esortazione apostolica "Evangelii Gaudium":

Se veramente crediamo nella libera e generosa azione dello Spirito, quante cose possiamo imparare dagli altri! Non si tratta solo di ottenere informazioni sugli altri per conoscerli meglio, ma di raccogliere quello che lo Spirito ha seminato in essi, come un dono anche per noi.

Qui il Papa stesso riconosce che lo Spirito Santo non discrimina tra i cristiani (Cristo non è diviso), ma egli distribuisce generosamente i suoi doni a tutti. Da qui l'invito allo scambio dei doni.

Che cosa possiamo scambiarci nei nostri congressi? Non siamo teologi, ma possiamo scambiarci le nostre esperienze, l'amicizia, le preghiere, la convivenza. Questo è molto se pensiamo ai secoli di incomprensioni e di battaglie vissute dei nostri antenati.

Come ebbe a dire papa Francesco nell'incontro con i Valdesi:

L'unità si realizza camminando, con la

la preĝo, per la daŭra konvertiĝo, persona kaj komunuma, per la helpo de la teologoj, sed precipe fidante en la agado de la Sankta Spirito.

Mi scias, ke ne ĉiuj ŝatas la ekumenajn kongresojn, kelkaj sentas sin pli hejmece en apartaj kongresoj. Ni respektu iliajn sentojn, pro tio la venontan jaron ni havos apartajn kongresojn.

Ni konscias, ke vojoj de la Spirito, ne estas niaj vojoj, Liaj tempoj ne estas niaj tempoj. Ni estas kiel la masonistoj de la psalmo 127, konsciaj, ke se la Sinjoro ne konstruas la domon, senutile ni strebas; sed ni estas pretaj je Lia dispono.

En la nuna tempo, en kiu la kristanoj estas precipe persekutataj sendepende de ilia aparta konfeso, ni devas senti nin unuiĝintaj, agi kaj preĝi por la unueco.

continua conversione personale e comunitaria, con l'aiuto dei teologi, ma principalmente fidandoci nell'azione dello Spirito Santo.

Io so che non tutti amano i congressi ecumenici, alcuni si sentono più a loro agio nei congressi separati. Rispettiamo i loro sentimenti, perciò l'anno prossimo avremo congressi separati.

Siamo consapevoli che le vie dello Spirito non sono le nostre vie, i Suoi tempi non sono i nostri tempi. Noi siamo come i costruttori del salmo 127 consapevoli che se il Signore non costruisce la casa, ci affaticiamo inutilmente, ma siamo pronti a sua disposizione.

Nell'epoca attuale, in cui i cristiani sono perseguitati indipendentemente dalla loro particolare confessione, dobbiamo sentirci uniti, agire e pregare per l'unità.

Pri la jara kunveno de IKUE

Ĵaŭdon la 6an de Aŭgusto je la 10, okazis kunveno de IKUE en la kadro de la Ekumena Kongreso en Strasburgo. Ĉeestis dudek du Ikue-anoj. Pro la eta nombro de la partoprenantoj, kaj pro la ne tute regula kunvoko, oni ne atingis decidojn pri io ajn, sed estis nur donitaj informoj fare de la prezidanto kaj de la vicprezidantino de IKUE.

La prezidanto unue donis klarigojn pri la nuna situacio de la Centra Oficejo de IKUE, pri kiu zorgas nur unu persono, kiu ne povas fari ĉion. Li devas unue perlabori por vivi, ĉar la laboro en la Centra Oficejo estas senpage, li devas okupiĝi pri la sekretaria ofico, la kaso, la redaktado de Espero Katolika kaj la elsendoj de Radio Vatikana. Pro tio la kunvoko de la nuna kunveno estis farita lastmomente per Espero Katolika. Venontjare okazos la balotoj por la nova estraro kaj oni devos pli taŭge disdoni la taskojn. La prezidanto raportis pri la financa situacio, kiu, pro la diritaj kialoj, ne povis esti kontrolita de la revizoroj, kaj klarigis la situacio de la IKUE-domo, kiu nun estas oficiale posedaĵo de IKUE, pro tio

la impostoj multe kreskis kompare kun la antaŭa situacio en kiu la proprietulo de la domo estis ĝia loĝanto. Interalie baldaŭ li translokiĝos kaj la domo estos libera, pro tio ni devos pagi ankaŭ la duonon de la kunloĝantaraj elspezoj ĝis nun pagata de li. Estos tasko de la nova estraro trovi konvenan solvon por la utiligo de tiu domo.

La vicprezidantino, Marjia Belošević, parolis pri siaj sukcesaj klopodoj organizi venontjare IKUE-kongreson en Nitra, tuj antaŭ la U. K. por doni la eblecon facile partopreni en ambaŭ kongresoj. Jam ŝi pripensis skizon de programo kaj antaŭvidas la eldonon de la aliĝilo antaŭ la fino de la jaro. La temo koncernos la "Jaro de la Mizerikordo". Poste ŝi notigis kelkajn problemojn kaj iniciatojn, kiel la refarendan retejon de IKUE, la paĝojn de FaceBook kaj de eblaj aliaj retaj iloj, la venontjaran junularan renkontiĝon en Krakovo kaj pro tio la reaktiviĝon de la Junulara IKUE-sekcio. Ŝi proponis pretigi liston de anoj pretaj kunlabori (kiel pastroj, instruistoj, tradukistoj) kaj aliaj iniciatoj por la estraro.



MALFERMITAJ AL LA TUTA MONDO

Rubriko zorge de frato Pierluigi Svaldi

DESIDERA L'AMORE PIENO

Siamo pieni di desideri. Non si può vivere senza desideri. Dire che la vita è bella equivale a dire che è puro desiderio.

Scrivo Simone Weil: «*Nessun essere umano sfugge alla necessità di concepire fuori di sé un bene verso il quale si volge il pensiero in un moto di desiderio, di supplica e di speranza. Quindi si può scegliere solo tra l'adorazione del vero Dio e l'idolatria*» (Quaderni IV, pag. 205).

Non è possibile adorare se stessi.

A causa di questo “bene fuori di sé” si fanno molte violenze, dando anche inizio a contese furiose. Ne fa testo la guerra di Troia, scoppiata a causa del rapimento di Elena, ritenuta la donna più bella del mondo, e la morte per decapitazione di Giovanni il Battista che si è intromesso in questioni di matrimonio. Per questo il comandamento avverte di stare attenti a «non desiderare la donna d'altri», considerata quale proprietà privata di inestimabile valore. Già nel libro dell'Esodo il nono comandamento era unito al decimo: «*Non desiderare la casa del tuo prossimo; non desiderare la moglie del tuo prossimo, né il suo servo, né la sua serva, né il suo bue, né il suo asino, né cosa alcuna del tuo prossimo*» (Es 20, 17).

Con decisione viene fatto divieto di intromettersi nel campo dei desideri, divenuti proprietà. Siccome siamo desiderio e senza desiderio non ci è possibile vivere e nemmeno operare; togliere a qualcuno l'oggetto del suo desiderio equivale a ucciderlo. La religione stessa prende in seria considerazione

DEZIRU LA PLENAN AMON

Ni estas plenaj je deziroj. Sen deziroj ni ne povas vivi. Diri, ke la vivo estas bela estas kiel diri, ke ĝi estas nura deziro.

Simone Weil skribas: «*Neniu homo eskapas el la neceso koncepti ekster si mem bonon, al kiu direktiĝas la penso per movo de deziro, de suplika kaj de espero. Pro tio, oni povas elekti nur inter la adoron al la vera Dio kaj la idolkulton*» (Kajeroj IV, paĝo 205).

Ne eblas adori sin mem

Pro ĉi tiu “bono ekster si” oni faras multajn perfortojn, eĉ komencante furiozajn konfliktojn. Atestas ĉi tion la milito de Trojo, kiu originis pro la forrabo de Elena, virino taksata kiel la plej bela en la mondo, kaj la morto per senkapigo de Johano la Baptisto, kiu sin enŝovis en disputojn pri geedziĝo. Pro ĉi tio, la ordono informas ke ni atentu «ne deziri la virinon de aliaj», ĉar ŝi estas konsiderata kiel privata posedaĵo je netaksebla valoro. Jam en la libro de la Eliro la naŭa ordono estis kunigita kun la deka: «*Ne deziru la domon de via proksimulo, nek lian edzinon, nek lian sklavon aŭ lian sklavinton, nek lian bovon, azenon, aŭ ion, kio apartenas al via proksimulo*» (Eliro 20, 17).

Estas nepre malpermesite enŝoviĝi en la kampon de la deziroj fariĝintaj proprajaĵo. Ĉar ni estas deziro kaj sen deziro al ni ne eblas vivi kaj agi; forpreni de iu ajn la objekton de lia deziro signifas mortigi lin. La religio mem prenas en seriozan konsideron tiun ĉi problemon, eĉ memo-

questo problema, ricordando la necessità di verificare l'oggetto del nostro desiderio, che deve elevare l'uomo verso l'amore eterno. Nessuno è esonerato da questo compito.

L'amore che un uomo nutre per la sua donna è sacro anche perché lo esercita nell'amore verso Dio stesso. Infatti: rubare all'uomo il suo tesoro, il movente delle sue azioni, l'energia che gli viene dall'oggetto del suo amore equivale impedirgli di crescere nella capacità di amare; togliere l'aria a chi respira, l'acqua a chi ha sete, il paesaggio al viandante, il canto all'innamorato: significa distruggere una vita con la sua vocazione al pieno amore di Dio.

Il comandamento suggerisce anche il massimo impegno per non desiderare mai quello che hanno gli altri. Sembra dica: vivi il tuo amore, godi la tua donna, rendila felice; ama la tua famiglia e non distrarti a guardare quello che ha il tuo vicino; concentrati su quello che hai e che la società ti riconosce.


Il comando avverte che non è facile amare la vita, desiderare le cose belle, rispettare tutti. Perfino nel campo delle lingue esistono violenze e imposizioni: c'è chi si è legato a una sua lingua particolare, chi si è appassionato alle lingue antiche, chi si impegna solo per la lingua più economica o che rende di più, chi invece si rende disponibile per adottare una lingua internazionale che rispetti tutti. Questi ultimi desiderano aiutare tutti a curare la loro passione, il loro il tesoro, la loro lingua, almeno per evitare inutili tensioni. Nello stesso tempo invitano tutti a rispettare ogni lingua con le sue caratteristiche. Allora la lingua internazionale Esperanto sarà accolta così come è nata e per il servizio per cui è stata costruita..

rigante la neceson kontroli la objekton de nia deziro, kiu devas levi la homon al la eterna amo. Neniu estas sendevigita de ĉi tiu tasko.

La amo, kiun homo flegas pri sia virino, estas sankta, ankaŭ ĉar ĝi ekzercas lin en la amo al Dio mem. Fakte: ŝteli el la homo lian trezoron, la movimpulson de liaj agoj, la energion, kiu alvenas al li el la objekto de lia amo, egalas malebligi al li la kreskon en la am-kapablo; forpreni la aeron al tiu, kiu spiras, la akvon al tiu, kiu soifas, la pejzaĝon al la vojiranto, la kanton al la enamiĝinto signifas pereigi vivon kun ĝia alvoko al la plena amo al Dio.

La ordono sugestas ankaŭ la plej grandan sindevigon, por neniam deziri la havaĵojn de la aliaj. Ĝi ŝajnas diri: travivu vian amon, ĝuu vian virinon, feliĉigu ŝin; amu vian familion, ne distriĝu rigardante la havaĵojn de via najbaro; rigardu tion, kion vi havas kaj la societo agnoskas al vi.

La ordono informas ke estas nefacile ami la vivon, deziri la belaĵojn, respekti ĉiujn. Eĉ en la kampo de la lingvoj ĉe estas perfortoj kaj trudoj: estas iu, kiu ligiĝis al sia aparta lingvo, kiu pasiĝis por la antikvaj lingvoj, kiu engaĝiĝas nur en la plej ŝpariga aŭ profitdona lingvo, kiu male iĝas je dispono por adopti internacian lingvon, kiu respektu ĉiujn homojn. Ĉi tiuj lastaj deziras helpi ĉiujn flegi sian pasion, sian trezoron, sian lingvon, almenaŭ por forigi neutilajn tensiojn. Samtempe ĉi tiuj invitas ĉiujn homojn respekti ĉiujn lingvojn kun ĝiaj karakterizoj. Tiam la internacia lingvo Esperanto estos akceptata tia kia ĝi naskiĝis kaj por la servo por kiu ĝi estis konstruita.



Dirite inter ni ...



039

GRUPOJ

- Saluton!
- Saluton.
- Ĉu vi ricevis la inviton al la renkontigo de la Grupo?
- Jes, mi ricevis ĝin ĉi matenon.
- Kion vi opinias pri ĝi?
- Mi opinias, ke temas pri grava renkontigo.
- Pro la temoj, kiujn oni pritraktos. Certe.
- Nu, la unuan parton oni dediĉos al la prezento de vojaĝo.
- Sed parolos en Esperanto du lertaj samideanoj.
- Kaj tio donos al multaj la okazon praktiki la lingvon laŭ bonaj modeloj. Ĉar oni ne devas nur aŭskulti: oni devas ankaŭ levi demandojn.
- Kaj tio estas praktikado de la lingvo.
- Oni jam konas la itineron de la vojaĝo.
- Tio estas bona, ĉar oni povas legi anticipu iujn informojn pri la trairitaj urboj.
- Kaj povas okazi, ke en tiuj urboj iu el ni havas korespondanton.
- Ni devas ankaŭ kontroli, ĉu iu urbo estas ĝemelita kun la nia.
- Ankaŭ tio estas bona ideo.
- Sed tio rilatas la duan parton de nia renkontigo.
- Vi pravos, en la dua parto oni parolos pri ĝemelitaj urboj.
- Jes.

GRUPPI

- Salve!
- Salve.
- Hai ricevuto l'invito per l'incontro del Gruppo?
- Sì, l'ho ricevuto stamattina.
- Che cosa ne pensi?
- Son del parere che si tratta di un incontro importante.
- Per gli argomenti che si tratteranno. Certamente.
- Beh, la prima parte sarà dedicata alla presentazione di un viaggio.
- Ma parleranno in Esperanto due capaci amici esperantisti.
- E ciò darà a molti la possibilità di mettere in pratica la lingua secondo dei buoni modelli. Perché non si deve solamente ascoltare: si devono anche porre delle domande.
- E ciò è mettere in pratica la lingua.
- Si conosce già il percorso del viaggio.
- Ciò va bene, perché si possono leggere in anticipo delle informazioni sulle città attraverso le quali si è passati.
- E può essere che in quelle città qualcuno di noi abbia un corrispondente.
- Dobbiamo anche controllare se qualche città è gemellata con la nostra.
- Anche questa è una buona idea.
- Ma questo riguarda la seconda parte del nostro incontro.
- Hai ragione, nella seconda parte si parlerà di città gemellate.
- Sì.

- Oni parolos, tamen, ne pri nia urbo, sed pri urbo, kiu trovigas en nia provinco.
- La afero estas interesa. Ĉu en tiu urbo estas esperantistoj?
- Ŝajnas, ke ne.
- Tio estas eĉ pli interesa.
- Kial?
- Ĉar ni povus hipotezi plilarĝigon de nia agado al tiu urbo.
- Ni devas studi strategion.
- Memkompreneble.
- Ĉu vi jam havas ideon?
- Ĉu la unua, kiu kirlas en mia kapo?
- Jes, la unua.
- Nu, sen pripensi tro multe: ni povus utiligi Esperanton okaze de la komuna manifestacio kun la eksterlanda ĝemelita urbo.
- Se venos esperantistoj.
- Ili ja venos, ĉar estas ja la esperantistoj, kiuj okazigis la ĝemeligon.
- Tio estas skribita en la letero.
- Kaj tio estas bona oportuno.
- Kiun ni ne devas forlasi.
- Ni esperu, ke nia prezidanto apogu la ideon.
- Nia prezidanto certe apogos ĝin, ĉar ŝi estas batalema.
- Jes, nia prezidantino emas agadi.
- Kaj la okazo prezentigâs. Cetere, tio estas ankaŭ en la spirito de interagado kun aliaj grupoj.
- Ni povus komenci skribante al la esperantistoj de la ĝemelita eksterlanda grupo.
- Tion ni faru!
- Si parlarà tuttavia non della nostra città, ma di una città che si trova nella nostra provincia
- La cosa sarà interessante. In quella città ci sono esperantisti?
- Sembra di no.
- Questo è persino più interessante.
- Perché?
- Perché noi potremmo ipotizzare un allargamento della nostra attività a quella città.
- Dobbiamo studiare una strategia.
- Ovviamente
- Hai già un'idea?
- La prima che mi frulla in testa?
- Sì, la prima.
- Ebbene, senza pensarci troppo: potremmo utilizzare l'esperanto in occasione di una manifestazione in comune con la città straniera gemellata.
- Se verranno degli esperantisti.
- Verranno certamente, perché sono proprio gli esperantisti che hanno dato luogo al gemellaggio.
- Ciò è scritto nella lettera.
- E questo è una buona opportunità.
- Che non dobbiamo abbandonare.
- Speriamo che la nostra presidente appoggi l'idea.
- La nostra presidente l'appoggerà certamente, perché è battagliera.
- Sì, la nostra presidente è portata ad agire.
- E si presenta l'occasione. D'altro canto questo è anche nello spirito dell'interazione con altri gruppi.
- Potremmo incominciare scrivendo agli esperantisti del gruppo straniero gemellato.
- Facciamolo!



SUPERMARKTO

- Karulino...
- Kion vi deziras, trezoro?
- Ĉu vi volas, ke mi akompanu vin al la supermarkto?
- Nu, pluvas, mi ne intencas eliri.
- Sed ni devas aĉeti ion por mangi.

- Kompreneble, morgaŭ estos dimanĉo.
- Kion fari?
- Afero facile solvebla.
- Tio estas?
- Vi povas iri aĉeti la bezonataĵojn sen mi.

- Estas ideo: sed kion mi aĉetu?
- He, ĉi tio ne estas problema: mi faros liston por vi.
- Kaj mi aĉetos tion, kion vi listigos plus tion, kio al mi plaĉas.
- Nu, mi ja scias. ke vi aĉetos trinkaĵojn kaj glaciaĵon.
- Kiom bone vi konas min!
- Tio signifas, ke mi ne devas enlistigi tiujn du aferojn.
- Se vi volas, vi povas forlasi ankaŭ la terpomojn.
- Kompreneble, ĉar ili plaĉas al mi, kaj ĉar ili estas pesaj.
- Ne forgesu la salon.
- Ha, jes, mi diris al vi, ke ni estas preskaŭ sen salo.
- Verdire, salon ni havas, sed kun grajnoj dikaj.
- Bone, ni aĉetos la salon, sed estus pli bone se mi skribus mian liston.
- Jen ĉi tie folio.
- Kaj la kraĵono?
- Kaj jen ĉi tie kraĵono.
- Nu, ni vidu...
- Ni nepre devas aĉeti iom da viando.
-

SUPERMERCATO

- Cara...
- Cosa vuoi, tesoro?
- Vuoi che ti accompagni al supermercato?

- Beh, piove, non ho intenzione di uscire.
- Ma dobbiamo comperare qualcosa da mangiare.
- Naturalmente, domani è domenica.
- Che fare?
- Problema risolvibile facilmente.
- Cioè?
- Puoi andare a comperare le cose necessarie senza di me.
- È un'idea: ma che cosa devo comperare?
- Eh, non è un problema: ti farò una lista.

- Ed io comprerò quello che metterai in lista, più quello che piace a me.
- Bene, so già che comprerai bibite e gelato.
- Come mi conosci bene!
- Questo significa che queste due cose non le devo mettere in lista.
- Se vuoi, puoi lasciare via anche le patate.

- Naturalmente, perché mi piacciono e perché sono pesanti.
- Non dimenticare il sale.
- Ah, sì, ti ho detto che siamo quasi senza sale.
- A dire il vero, abbiamo il sale, ma a grani grossi..
- Bene, compereremo il sale, ma sarebbe meglio se scrivessi la mia lista.
- Ecco qui un foglio.
- E la matita?
- Ed ecco qui una matita.
- Ebbene, vediamo...
- Dobbiamo senz'altro comperare un po' di carne.

- Mi konsentas: sed ĉu vi volas bovid-viandon, porko-viandon, koko-viandon aŭ meleagro-viandon?
- Nu, ĉe la supermarkto mi preferus aĉeti fiŝon, ĉar poste mi intencus iri aĉeti ĉevalo-viandon ĉe la viand-vendisto.
- Sed vi diris, ke ni devas nepre aĉeti viandon ĉe la supermarkto.
- Kompreneble.
- Kaj do?
- Ni devas aĉeti viandon por fari buljonon.
- Ĉu vi havas rizon?
- Jes, tion mi jam havas, sed se estas iu aparta oferto, profitu.
- Kaj pri la fiŝo?
- Elektu vi mem.
- Ĉu vi preferas ion apartan?
- Ne, vi scias, ke mi volonte manĝas kiun ajn fiŝon.
- Mi supozas, ke vi volas la lakton
- Jes, oni devas nepre aĉeti ĝin.
- Ĉu unu litron?
- Jes, parte senkremigitan.
- Bone.
- Kaj kontrolu la daton.
- Ĉu mi aĉetu salumaĵojn?
- Ne, salumaĵojn ni havas. Prefere aĉetu fromaĝojn.
- Ne zorgu pri tio.
- Mi skribas ankaŭ: pasto, fruktoj kaj legomoj.
- Mi aĉetos salaton, oranĝojn, melongenojn, pomojn, pirojn kaj brasikojn.
- Jen la listo: vi povas iri.
- Mi prenas la ĉareton.
- En ordo. Revenu baldaŭ.
- D'accordo, ma vuoi carne di vitello, carne di maiale, carne di pollo o di tacchino?
- Beh, al supermercato preferirei, comperare del pesce perché dopo avrei intenzione di andare a comperare la carne di cavallo in macelleria.
- Ma hai detto che dobbiamo senza-meno comperare della carne al supermercato .
- Naturalmente.
- E allora?
- Dobbiamo comperare della carne per fare il brodo.
- Hai del riso?
- Sì, ne ho, ma se c'è qualche offerta particolare, approfittane.
- E riguardo ai pesce?
- Scegli tu.
- Preferisci qualcosa di particolare?
- No, sai che mangio volentieri, qualsiasi pesce.
- Credo che tu voglia il latte.
- Sì, bisogna comperarlo senz'altro.
- Un litro?
- Sì, parzialmente scremato.
- Bene.
- E controlla la data.
- Devo comperare del salumi?
- No, i salumi li abbiamo. Piuttosto compera dei formaggi.
- Non preoccuparti di ciò.
- Scrivo anche: pasta, frutta e verdura.
- Comprerò insalata, arance, melanzane, mele, pere e cavoli.
- Ecco la lista: puoi andare.
- Prendo il carrellino.
- Va bene. Torna presto.



Nia eta Parnaso

Rubrica dedicata alla Poesia

Rubriko dediĉita al Poezio

RONDINI

*Festa di rondini
nel rosso crepuscolo
di ottobre!
A centinaia
volteggiano incrociandosi
in larghi cerchi
fino a riva,
quasi a baciare l'onda.
Poi giri in tondo
sul mio capo:
ai nidi vuoti l'ultimo saluto.
Nel linguaggio stridulo
festoso
"nidi lasciamo a te"
sembrano dirmi
"torneremo"...*

*Oh rondinelle amiche,
quante volte ho vagato
sulle vostre ali!
Oggi in cieli vorrei con voi librarmi,
ma la terra mi tiene:
pianta senza radici.*

(Anna Amorelli Gennaro)

HIRUNDOJ

*Festo de hirundoj
en la ruĝa krepusko
de oktobro!
Centoj da ili
ĉirkaŭflugas interkruciĝante
per larĝaj rondoj
ĝis la marbordo,
kvazaŭ kisonte l' ondon.
Poste rondiroj cirkle
super mia kapo:
al malplenaj nestoj lastan saluton.
Per la ĉirpanta, gaja
lingvaĵo
"al vi nestojn ni lasas"
ili ŝajnas diri:
"ni revenos"...*

*Ho amikaj hirundetoj,
kiomfoje mi vagadis
sur viaj flugiloj!
Hodiaŭ kun vi mi volus ŝvebi ĉiele,
sed la tero min retenas:
senradikan kreskaĵon.*

(esperantigis Norma Cescotti)

SCIIGOJ EL AFRIKO

Rubrica rivolta alle notizie dal mondo esperantista africano.

Rubriko celanta doni sciigojn el Afrika Esperantujo.

Repubblica democratica del Congo:

Il dott. Renato Berti presidente della fondazione "Esperanto Rimini (Don Duilio Magnani - Enzo Scatassa)" ci ha inoltrato un messaggio di Alexandrine Omba che tiene corsi di esperanto in Kinshasa:

"...Le volevo dire che ho girato un film di 10 minuti in esperanto, che ho sul computer. Ho intenzione di girarne un altro, ma mi mancano i mezzi per trovarmi in una buona situazione ed essere in grado di farlo. Se potesse trovarmi uno sponsor che mi permetta di realizzare i miei sogni, sarebbe perfetto. Cambierei la percezione che si ha di questa lingua nella Repubblica Democratica del Congo facendo film, rappresentazioni teatrali... in esperanto. A ottobre o novembre 2015 organizzerò un grande evento, dove esporrò le mie opere e consegnerò gli attestati a coloro che hanno partecipato al corso d'esperanto, ma ho bisogno dei vostri finanziamenti per riuscire a organizzare tutto.

Quest'anno abbiamo organizzato (oltre al film) solo una modesta manifestazione per la Giornata Internazionale della Donna e i bambini hanno messo in scena una rappresentazione che ho ideato io, dal titolo : « virino, levigu ! » « Donna, alzati ! ». Per le attività, svolte durante la Giornata Internazionale della Donna, ho speso più o meno 200\$ e per il film più di 500\$ perché sto ancora pagando dei debiti. Questo è tutto ciò che le posso dire sulle attività che ho organizzato. Se volete una relazione, la farò. Il suo supporto finanziario mi aiuterà a superare questa difficile situazione."

(traduzione di Renato Berti)

Chi volesse vedere il suddetto film di 10 minuti lo può trovare su questa pagina in esperanto di "Radio Cina International":

<http://esperanto.cri.cn/1621/2014/12/25/165s169980.htm> da cui potrà constatare che viene parlato in un buon esperanto.

Complimenti all'insegnante e alla Fondazione Esperanto Rimini che sovvenziona i corsi.

Dalla stessa pagina abbiamo ricavato la foto dell'insegnante e questa sua presentazione:



Mia nomo estas Alexandrine Omba Tshame-na, mi estas Kongolandano kaj loĝas en Kongo DR. Mi eklernis Esperanton en 2009 ĝis nun. Mi estas instruistino. Mi instruas Esperanton kaj religian kurson al ĉiuj gelernantoj en lernejo. Ekde 2009, mi havis ideon krei E-klubon por disvastigi la lingvon Esperanton kaj por krei teatran trupon en Esperanto kaj mi sukcesis krei E-klubon kaj verkis kelkajn historiojn esperante. Nun, mi daŭrigas la instruadon kaj la verkadon. Mi volas ke, iam mi fariĝu verkistino pri Esperanto. Pri Esperanto, mi estas membro de DKEA, la landa asocio de UEA en nia lando. Mi estas la kreinto de la klubo "EGSR" Esperantista Grupo De Sankta Rita. Mi ĵus kreis novan feminisman grupon de Esperanto "EVIK" Esperanta Virinaro Kongolanda kies mi estas konsilantino. Mi jam organizis multajn manifestojn pri Esperanto, inter aliaj kulturajn tagojn, ktp.

NOTIZIE IN BREVE

Radio Vaticana



Come si sa, da un po' di tempo, quasi tutti i programmi di Radio Vaticana non sono più diffusi via onde radio, ma

per via telematica (podcast), perciò il loro ascolto richiede una connessione a internet. Questo vale anche per le trasmissioni in esperanto. Attualmente stanno riorganizzando tutto il sistema per cui gli indirizzi di rete sono cambiati e molti di noi non sanno più come collegarsi.


Il modo più semplice è accedervi dal sito dell'UECI (www.ueci.it) cliccando su uno dei link del menu di sinistra (vedi figura).

Il primo collega con le trasmissioni domenicali (2° programma), il secondo con quelle di mercoledì e giovedì, il terzo si collega al "Radio Arkivo" dell'IKUE su cui le trasmissioni vengono regolarmente memorizzate ed archiviate da Mike Leon.

Nei primi due casi, il collegamento è al sito di Radio Vaticana che conteggia a fini statistici i nostri accessi; nel terzo caso c'è la possibilità di ricercare una trasmissione su un determinato argomento

Con il nuovo sistema, Radio vaticana non cancella più le trasmissioni precedenti. per cui per ascoltare scegliete la data della trasmissione desiderata e sotto, nella zona in banda grigia cliccate sul nome del file multimediale con estensione ".mp3". È evidente che dovete avere installato un lettore "mp3". (Nota: i programmi del mercoledì sono erroneamente indicati con "ĵaŭde" comunque la data è corretta).

Espero Katolika



Negli ultimi anni Espero Katolika, il più antico periodico esperantista ancora pubblicato, non è uscito regolarmente con conseguenti lamentele degli abbonati e mancato rinnovo di numerosi abbonamenti. La causa principale e dovuto al superlavoro del redattore, Carlo Sarandrea, che già

si deve occupare delle trasmissioni di Radio Vaticana, della segreteria e della sede dell'IKUE e soprattutto della sua attività professionale che gli dà di che vivere (ricordiamo che chi lavora per l'IKUE lo fa a titolo gratuito). Gli abbonati si saranno accorti che recentemente hanno ricevuto tutti i numeri arretrati e che l'uscita dei nuovi numeri si avvia alla regolarità. Questo è stato ottenuto con la decisione di affiancare a Carlo un secondo redattore, Miloslav Šváček, che si occupa anche dell'impaginazione. Carlo continua ad essere coinvolto perché vivendo a Roma e occupandosi delle trasmissioni della radio Vaticana può recepire di prima mano le informazioni sulla Chiesa. La nostra rivista è apprezzata anche per la qualità della lingua per cui prima della stampa i due redattori e il presidente dell'IKUE ne controllano stile, ortografia e sintassi. Purtroppo il numero degli abbonati si è ridotto drasticamente per cui tanto lavoro per così poco può essere scoraggiante. Chiediamo pertanto ai nostri lettori di dare fiducia a questo rinnovamento redazionale con un abbonamento a Espero Katolika. Vada un ringraziamento di tutti ai redattori.


IKUE-kongreso 2016

La vicepresidente dell'IKUE, Marjia Belošević, si sta occupando dell'organizzazione del congresso IKUE del prossimo anno. Ha trovato a Natra (Slovacchia) località dove avverrà il Congresso Universale UEA. Il con-



gresso IKUE sarà nella settimana precedente quello universale per cui i partecipanti potranno partecipare ad ambedue i con un solo viaggio. Si prevede che l'aligilo con una bozza di programma sarà pronto per la fine dell'anno. La località è interessante, i prezzi contenuti: ci aspettiamo una partecipazione numerosa.

Gerusalemme: "Patro Nia"



Nel n° 2/2015 di *Katolika Sento*, avevamo segnalato che la tavola con la scritta del "Padre Nostro" in esperanto posta sul muro di cinta della chiesa del *Pater Noster* in Gerusalemme (Monte degli Ulivi) necessitava di un restauro e si proponeva una raccolta di denaro allo scopo.

A tal fine, il gruppo di Treviso il 23 aprile ha raccolto e spedito a padre Bernhard Eichkorn 175 euro.

Per non essere da meno, a Milano sono stati raccolti e spediti per lo stesso motivo altri 250 euro.

A tal proposito padre Bernhard ci comunica che al 23 agosto gli sono pervenuti in totale 2708 euro per cui chiederà quanto prima un preventivo più preciso a Yehuda Miklaf che si interessa della cosa.

Elezioni IKUE



L'anno prossimo si dovrà rinnovare la dirigenza dell'IKUE: un presidente, cinque membri del consiglio direttivo e tre revisori dei conti. Come previsto dallo statuto, chi volesse candidarsi ad alcuno dei detti incarichi lo comunichi al segretario dell'IKUE.

Novant'anni

Sono stati recentemente festeggiati due dei nostri soci che hanno compiuto novant'anni. Ambedue godono di buona salute per cui abbiamo motivo per prepararci a festeggiare anche il loro secolo di vita.

Il primo è il presidente del Circolo Esperantista Milanese, dott. **Gianfranco Polerani**, che ha varcato la soglia dei novant'anni il 28 maggio. Personaggio noto nel mondo amministrativo milanese è stato per lungo tempo revisore dei conti sia della FEI sia dell'UEA. Tuttora è di valido aiuto per le iniziative del Circolo Milanese grazie alle sue conoscenze della macchina amministrativa comunale.

Il secondo è il prof. **Giuseppe Venturini** del gruppo UECI di Treviso che ha compiuto 90 anni il 13 agosto. Serio Boschini, che ci informa dell'evento, ci fa sapere che il festeggiato è socio Ueci/Ikue da più di 60 anni e, nonostante l'età, gode buona salute, corrisponde in esperanto con una signora slovacca. In passato ha insegnato a lungo ai sordomuti di Marocco-Mogliano Veneto (TV). È noto per le sue ricerche e pubblicazioni sulla storia del suo paese, Mogliano Veneto.



NI FUNEBRAS KAJ KONDOLENCAS

A distanza di più di un anno, veniamo a conoscenza della morte di don Pasquale Campobasso avvenuta il 10 febbraio 2014. Parroco di Spadarolo (Rimini) fino al 1999 fu ordinato sacerdote insieme a don Duilio Magnani nel 1953 dal vescovo Luigi Santa. Membro vitalizio dell'IKUE, fu presidente del gruppo UECI di Rimini. Ricordiamolo con una preghiera di suffragio.

GIOVANI CONCORRETE

L'UECI dispone di n° 3 premi da 500,00 € ciascuno da assegnare a giovani di età compresa tra i 18 e 30 anni, iscritti all'UECI che conseguano il diploma di esperanto di terzo grado. I premi saranno erogati quale contributo per la partecipazione a un congresso dell'UECI o dell'IKUE. Gli interessati si rivolgano al presidente UECI

NORME E QUOTE ASSOCIATIVE PER L'ANNO 2015

Associato ordinario <i>con Katolika Sento</i> (SO)	22,00 €
Associato giovane <i>con Katolika Sento</i> (SG)	11,00 €
Associato familiare <i>senza Katolika Sento</i> (SF)	11,00 €
Associato ordinario <i>con Espero Katolika</i> (SOE)	43,00 €
Associato sostenitore <i>senza Katolika Sento</i> (SS)	43,00 €
Associato sostenitore <i>con Espero Katolika</i> (SSE)	86,00 €
Solo abbonamento a <i>Katolika Sento</i> (AK)	10,00 €
Solo abbonamento a <i>Espero Katolika</i> (AE)	21,00 €

È associato giovane chi non ha superato i 25 anni. È associato familiare chi convive con altro associato. Specificare nella causale del versamento la categoria dell'associato, l'anno di nascita dei giovani, l'esatto indirizzo per il recapito del periodico K.S., la destinazione di eventuali offerte.

I gruppi locali con almeno 10 soci trattengono 2,10 € per l' associato ordinario e 1,05 per l'associato giovane o familiare.

I versamenti vanno fatti sul C.C. Postale n. 47127675 *Unione Esperantista Cattolica Italiana U.E.C.I* codice IBAN: IT66 R076 0101 6000 0004 7127 675 Codice BIC/SWIFT: BPIITRXXX

Nota: Sull'etichetta/indirizzo con la quale avete ricevuto questa copia di *Katolika Sento* è indicata la sigla associativa e l'anno di scadenza dell'abbonamento.

COMITATO CENTRALE U.E.C.I.

Presidente: Giovanni DAMINELLI, via Lombardia 37, 20099 Sesto S.Giovanni (MI) – tel. 02.2621149 – katolika.sento@ueci.it (la residenza del presidente è anche sede dell'associazione)

Vice presidente: Norma COVELLI CESCOTTI, via E.Fermi 29, 38100 Trento – tel. 0461.925210

Segretario/cassiere: fra Pierluigi SVALDI, Belvedere San Francesco 1, 38122 Trento – tel. 0461.230392

Consulente culturale-religioso: Ida BOSSI, Viale Faenza, 26/7 20142 Milano

Responsabile dei congressi: Giovanni CONTI, via F.Filzi 51, 20032 Cormano (MI) – tel. 02.66301958

Consulente informatico: Tiziana FOSSATI, via F.Filzi 30/A, 20035 Lissone (MB) - tel. 039.464942

Consulente editoriale: Carlo SARANDREA, Via di Porta Fabbrica 15, 00165 Roma – tel. 06.39638129

Addetto alla logistica: Felice SOROSINA, Via Sarnico 17, 24060 Tavernola (BG) – tel. 035.932298 –

Assistente Ecclesiastico: mons. Giovanni BALCONI, p.zza Duomo, 16, 20122 Milano

Nota bene: Tutte le comunicazioni alla redazione di *Katolika Sento* vanno spedite al presidente UECI.

AMUZE

Ĉiuj ajn rajtas kontribui sendante al ni siajn humoraĵojn, kondiĉe ke ili estu en Esperanto.



(el www.gioba.it - sendis Tiziana Fossati)

ESTAS LANDOJ EN LA MONDO, KIE LA KRISTANOJ, NUR POR IRI AL LA MESO, ESTAS PRETAJ RISKI LA VIVON.

ĈE NI, MAKSIMUME, ILI ESTAS PRETAJ RISKI LA VIVON POR NE PERDI LA FINSEZONAJN RABATOJN ĈE LA KOMERCA CENTRO

Medicina kurso

Dum la enkonduka leciono la profesoro asertas:

– Kiel estontaj kuracistoj, vi devas obei du principojn: unue observi ĉion plej detale, due naŭziĝi pri nenio. Pro tio mi portis ujon kun urino. Vi devas trempi en ĝi vian fingron por kontroli se ĝi entenas sukeron. Jen kiamaniere.

Kaj trempinte la fingron en la urino li lekas ĝin, poste li petas la studentojn fari la samon. Ili, unu post la alia metas la fingron en la ujon kaj legas ĝin. Fine la profesoro gratulas ilin:

– Bone mi vidis, ke neniu el vi naŭzis, sed vi forgesis la unuan principon: vi tute ne rimarkis, ke mi trempis la mezan fingron kaj lekis la montran.

Bopatrino

Dimanĉon matene oni sonorigas ĉe la pordo. La edzo iras malfermi. Temas pri lia bopatrino alveninta kun multaj valizoj:

– Bonan tagon, kara bofilo!
– Bonan tagon. Kial tiom da valizoj? Ŝajnas, ke vi volas translokiĝi ĉi tien. Kiom da tempo vi pensas resti?

– Mi restos ĝis la homoj enuos pro mi.

– Ĉu vi ne volas resti almenaŭ por trinki kafon?

En tribunalo

La juĝisto al la akuzato:

– Vi murdis viajn gepatrojn. Laŭleĝe vi devas esti kondamnita al dumviva karcero. Ĉu via advokato povas diri ion por mildigi la penon?

– Jes, via ekscelenco: li estas kompatinda orfo.

Infanaj demandoj

Infanino pridemandas la patrinon:

– Panjo, vi diris, ke vin naskis via patrino, kiun naskis via avino, kiun naskis prava avino. Sed, komence, de kiu ni venas?

– De Adamo kaj Eva, kiuj estis kreitaj de Dio mem. Ili naskis infanojn, kiuj siavice naskis infanojn, ĝis ni.

Poste ŝi sin turnas al patro:

– Paĉjo, de kie ni venas.

– En la komenco estis simioj, de kiuj venis la homoj.

La infanino reiras al la patrino:

– Panjo, paĉjo diras, ke ni venas de la simioj, kial vi diris ion alian?

– Filino kara, mi rakontis pri mia familio, ne pri la familio de via patro.

Lerneje

La instruisto al la lernanto:

– Kiom estas la rapideco de la lumo?

– Mi ne scias, sed matene ĝi alvenas tro rapide.

p://www.ueci.it/k_sento/ks_2015/

